

ĉap.52 La vojo havas komenciĝon...

La mondo havas komenciĝon, tio estas la patrino de l' mondo.¹⁾ Jam havas ĝian patrinon, do oni konas la filon. Revenu kaj gardu la patrinon, do ĝis vi mem malaperi, ne kompromitiĝos. Stopu buŝon kaj fermu la pordon,²⁾ do ĝis morti ne laĉiĝos (vidu ĉap.56). Se malfermus la buŝon kaj klopodus aferojn, ne estus savita ĝis vivfino. Vidi malgrandecon nomu klera, kaj persisti molecon nomu forta. Kvankam uzus la scion, se revenos al la klereco, ne postrestigos sur si plaĝon. Ĉi tion nomu ĉiama tradicio.

Komentario:

En la koro la brilo de ekscio unue ekmoviĝas, kaj due troviĝas la substanco de klereco.

P.N.

- 1) patrino de l' mondo - la vojo.
- 2) pordo - agado.

ĉap.53 Eĉ se iu igus administri...

Eĉ se iu min igus administri prudente agi la grandan vojon, mi timus nur apliki tion. La granda vojo estas tre ebena, sed al popolo plaĉas vojeto. En la mateno korto estas tre sarkita, dume kampo estas tre dezerta; provizejo estas tre vakanta, kaj vesti elegantan regantan veston, kaj zoni akran glavon, satvomi de mango, kaj troabundi de posedaĵoj. Ĉi tion nomu ŝtelista aroganto. Ja, kontraŭvoja ago!

Komentario:

Insulto kontraŭ registoj en la tempo de Lao-cu, sed nun ankoraŭ tio estas freŝa fakto en la mondo.

ĉap.54 Bone konstruita ne estas...

Bone konstruita¹⁾ ne estas laborebla; bone ĉirkaŭ-brakita²⁾ ne defalas (vidu ĉap.10). Se ies idoj ne ĉesas jubilean feston, kaj kulturas por si, tiam la virto nome estas vera. Kulturas por sia hejmo, tiam la virto nome estas superresta; kulturas por sia provinco, tiam la virto nome estas longedaŭra. Kulturas por sia regno,

tiam la virto nome estas abunda. Kulturas por la mondo, tiam la virto nome estas universala. Tial konceptu sin mem per si mem;³⁰ konceptu hejmon per hejmo; konceptu provincon per provinco; konceptu regnon per regno; konceptu la mondon per la mondo. Kial mi scias, ke la mondo estas tiel? Câr pro tio ĉi.

Komentario:

Refuto kontraŭ konfucianisma rutino "sin-kluturo, ordigo de sia hejmo, super-rego de regno, kaj pacigo de l' mondo" kiel la stereotipa procezo. Lao-cu rekomendis "konceptu vin mem kiel la veron de virto".

P.N.

- 1) bone konstruita - starigi sian virton.
- 2) ĉirkaŭbraki - la vojon.
- 3) koncepti si mem per si mem - konpati de sia-vico.

ĉap.55 Komparu riĉecon de virto...

Komparu riĉecon de virto kun suĉinfano. Eĉ venenaj insektoj ne pikas, eĉ sovaĝaj bestoj kaj rabbirdoj ne atakas. Kvankam ĝiaj ostoj estas malfortaj kaj muskoloj estas molaj; ĝi manpremas

fortike. Ĝi ankoraŭ ne scias kuniĝon de geseksoj, tamen funkcio de organeto montras ekstremojn de esenco. Kvankam tuttagon ĝi ploregas, tamen ĝia gorĝo ne raŭkiĝas; tio montras ekstremojn de harmonio. Scii harmonion nomu konstanto; scii konstanton nomu klara; riĉigi vivon nomu feliĉo; la koro mastrumi spiriton nomu forto. Ĉio prosperiĝas, do maljuniĝas. Tion oni nomas kontraŭvoja, kaj kontraŭvoja baldaŭ finiĝas.

Komentario:

Revidu ĉap.30. Ne-plenkreskinta infano estas riĉa de virto. Kiam homoj maturiĝas kaj prosperiĝas, ili pereas. Dume la vojo konstante harmonias kaj ne pereas.

ĉap.56 Scianto ne parolas...

Scianto ne parolas. Parolanto ne scias. Stopu ĝian buŝon; kaj fermu ĝian pordon (vidu ĉap.52). Disfrakasu la akrecon; reordigu la komplikon; harmoniigu la lumon kaj agordu kun la polvo (vidu ĉap.4). Tion ĉi nomu eksperta sameco. Tial, akiru, tamen ne intimiĝu; ankaŭ akiru, tamen ne malintimiĝu. Akiru, tamen ne

utiligu; ankaŭ akiru, tamen ne malutiligu. Aki-
ru, tamen ne estimu; ankaŭ akiru, tamen ne
malestimu (la vojon). Do, ĝi fariĝas la estim-
indaĵo de l' mondo.

Komentario:

"Eksperta sameco" signifas senelstaran
humilecon de eksperta vojakirinto, kiu
memmiksiĝas kun ordinaraj homoj.

ĉap.57 Regu regnon per justo...

Regu regnon per justo, uzu armeon per sprit-
eco. Prenu la mondon per senafero. Per kio mi
scias tion? Pro tio ĉi. Jen, se en la mondo
estas multaj malpermesoj, tamen popolanoj estas
des pli malriĉaj; se ĉe popolanoj estas multaj
utilaj iloj, la ŝtato des pli mallumiĝas. Se
havigas tekniklertecon al homoj, do strangaĵoj
des pli prosperas. Se leĝoj kaj dekretoj ju pli
evidentiĝas, ŝtelistoj des pli multiĝas. Tial
sanktulo diras: Mi estas nenion faranta, tamen
popolanoj memevoluas. Mi amas kvietecon, tamen
popolanoj memjustiĝas. Mi estas senafera, tamen
popolanoj memriĉiĝas. Mi estas senvola, tamen

popolanoj memŝtipiĝas.

Komentario:

Tiu ĉi ĉapitro estas la plej frua
opinio de anarkiismo, kontraŭ malutileco
de politiko kaj superregado de homo al
homo. Negacio kontraŭ ŝtato, leĝaro kaj
kapitalismo estis deklarita de Lao-cu
iniciative.

ĉap.58 Se la politiko estas...

Se la politiko estas neperfekta, la popolo
estas honesta. Se la politiko estas rigora, la
popolo estas malkontenta. Plago estas depend-
ejo de feliĉo; feliĉo estas embuskejo de plago.
Kiu scipovus la poluson? Ĝi ja ne havas finon.
Eĉ justeco ekscesos, dubindiĝos; boneco ankaŭ
ekscesos, groteskiĝos. Homoj superstiĉiĝas jam
de longe. Pro tio sanktulo estas rekte justa,
tamen ne kiel akrefendita; ĝi estas akrega,
tamen ne kiel klingo; rekta, tamen ne etendas.
Ĝi lumas, tamen ne brilas.

Komentario:

Oni diras, ke la plej bona regado estas
la plej malperfekta. Ĉio ekscesa estas
malpli bona ol nenio.

ĉap.59 Regi homojn kaj servi...

Regi homojn kaj servi al naturo, preferinda ne estas alia ol esti avara. Jen, estu nur avara, tion nomu frureveni al naturo. Frurevenon nomu virto-ŝarĝobligo; Virto-ŝarĝobligo, nome ne estas nevenkebla; se ne nevenkebla, nome ne estas scii la finon. Se ne estas scii la finon, povas posedadi regnon. La patrino de regno-posedado povas esti longeterna. Tion ĉi nomu radiki profunde kaj. hardigi radikaron, aŭ la vojo de longviva kaj eterne rigardanta.

Komentario:

Negativa avara ŝparemo, nome humileco estas necesa por regado al homo kaj naturo. Avertu kontraŭ senavara konsumismo de nuna civilizacio.

ĉap.60 Legi grandan landon...

Regi grandan landon faru kvazaŭ kuiri fiŝeton. Frontu al la mondo per la vojo, do eĉ satano estus ne dieca. Ne nur satano estus ne dieca, sed dio ankaŭ ne difektas homon. Ne nur dio ne difektas homon, sed ankaŭ sanktulo ne

difektas homon. Jen, ambaŭ ne interdifektas, tial virto sinsekve reveniĝas.

Komentario:

Por regi regnon oni ne devas ofte tuŝi popolon. Se oni regas laŭ la vojo, eĉ oponanta satano ne povas havi diecan forton. Se oni ne difektas homon, ĉio atribuos al la virto.

ĉap.61 Granda lando, nome...

Granda lando, nome estas malsupra rivero kaj komplekso de l' mondo, kaj la ino de l' mondo; ino ĉiam superas super viro per kvieteco, kaj kun la kvieteco faras subiĝon. Tial se granda lando subiĝas malgrandan landon, do okupas malgrandan landon. Se malgranda lando subiĝas sub granda lando, do ĝi estas okupita de granda lando. Tial aŭ subiĝinte okupas, aŭ subiĝinte estas okupita. Granda lando nur volas kune paŝti homojn kaj ne plu. Malgranda lando nur humile volas servi al homoj. Jen, ambaŭ akiras siajn, kiujn volas. Tial la granda nepre faru subiĝon.

Komentario:

Tie ĉi montriĝas la principa esenco de interhelpo. Pli grandaj kaj pli kapablaj devas kunlabori kun malgrandaj. Se tiel estas, ĉio povas iradi harmonie.

ĉap.62 La vojo estas esotero...

La vojo estas la esotero de ĉio kaj la trezoro de bonuloj, tiu, kiun nebonuloj tenas. Belaj vortoj estas vendeblaj en merkato; ŝatindaj agoj estas aldonindaj al homoj. Kvankam malbono de homo ne devas forigi, tial, starigas reĝon kaj instalas princojn. Kvankam la saĝulo estas invitata kun juvelo antaŭ reĝa kaleŝo, tamen tio ne estas pli ol sidante marŝi ĉi tiun vojon. Kio estas kialo, kial en antikveco oni ŝatis tiun ĉi vojon? Ĉu oni ne diris? Postulu do akiros; kvankam kulpa, senkulpiĝas. Tial, la vojo fariĝas estimindaĵo de l' mondo.

Komentario:

"Postulu, - do estos donita", tiu ĉi kristana principo jam plifruue estis dirita en Ĉinio. La vero de l' vojo estas universala por ĉiuj postulantoj.

ĉap.63 Faru nenion-faradon...

Faru nenion-faradon; okupiĝu senaferon; gustumu senguston; la malgrandan vidu grandan; malamon rekompencu per virto. Planu malfacilan en facila; ĉe bagatelo faru grandan. Malfacilaĵoj de l' mondo nepre ekfunkcios de facileco. Grandaj aferoj de l' mondo nepre ekfunkcios de bagatelo. Tial sanktulo finfine ne faras grandaĵon, tial la grandaĵo povas fariĝi. Jen, flirtanima konsento estas nepre malkredinda; facilema nepre estas malfacilema. Tial eĉ sanktulo vidas tion malfacila, tial finfine ne estas malfacileco.

Komentario:

La ekstremo de etiko estas "malamon rekompencu per virto". Ĉiuj esencoj de homamaj religioj estas postsekvantoj de Lao-cu.

ĉap.64 La trankvila estas facila...

La trankvila estas facila teni; ne ankoraŭ aŭguranta estas facila projekti; la rompema estas facila rompi; la mikrona estas facila disiĝi. Faru tion antaŭ ol estiĝos; regu tion antaŭ ol tumultiĝos; eĉ ĉirkaŭ-brakebla arbego kreskas de eta arbido; eĉ alta domego komenciĝas ekde termaseto; mil mejloj da vojiro komenciĝas de sub unua paŝo; faranto rompas tion; prenanto perdas tion. Tial, sanktulo ne faras, tial ne malsukcesas; ne prenas, tial ne perdas. Kiam oni sinokupas pri io, ofte malsukcesas antaŭ ol apenaŭ elfarita; estu diskreta ĉe fino kiel komenco, do afero ne malsukcesos. Tial sanktulo volas nevolon kaj ne ŝatas malfacile akireblan; lernas ne lerni kaj atribui al la loko kien popolamaso pasas; tiamaniere asistas naturon de ĉio, sed ne faras kuraĝeme.

Komentario:

Sanktulo kunlaboras kun naturo, sed ne kuraĝas agi laŭ sia deziro, tial ĉio iras bone laŭ la vojo.

ĉap.65 Antikva bona vojkulturinto...

Antikva bona vojkulturinto ne estis per tio kleriganta popolon, sed malsaĝiganta popolon, ĉar malfacileco regi popolon kaŭzas de tro da scisaĝo. Regi regnon per scisaĝo estas regnorabisto. Ne regi regnon per scisaĝo estas feliĉo de l' regno. Scii tiujn ambaŭ estas regula modelo. Ĉiam scii regulan modelon oni nomas mistera virto. Mistera virto estas ja profunda! Ja malproksima! Tio kontraŭoponas materion! Tio do atingas la grandan vicon.

Komentario:

La mistera virtokaj la sistemo ne iras laŭ materia regulo, sed direktas sin al la granda vicordo de l' universo.

ĉap.66 Ke riveregoj kaj maroj...

Ke riveregoj kaj maroj povas esti la reĝo de cent valoj, ĉar ili povas subiĝi ĝin, tial povas iĝi centvala reĝo. Tial sanktulo, se volus superigi, nepre malaltigas sin per virtoj; se volus anticipi popolon, nepre postigas sin mem. Pro tio sanktulo situas supre, tamen popolo ne

sentas pezon; situas antaŭe, tamen popolo ne sentas malhelpon. Pro tio la mondo ĝuas rekomendi, tamen ne malŝatas. Ĉar ĝi ne kontestas, tial la mondo povas ne kontesti kun ĝi.

Komentario:

Humileco, sinsubigo rezultigas tie kolektiĝon de ĉiuj reputacioj kaj fidoj. Do, la mondo tion rekomendas kiel modelon.

ĉap.67 En la mondo ĉiuj diras...

En la mondo ĉiuj diras, ke mi estas granda, sed similas al nebonsimilulo¹⁾ al antaŭulo. Jen, nur granda, tial similas al nebonsimilulo. Se mi bonsimilus, ja longe daŭrus en la detalo! Mi havas tri trezorojn, kiujn mi posedas kiel trezorojn. Unua estas humaneco; dua estas ŝparemo; tria estas ne kuraĝi anticipi en la mondo. Humaneca kaj tial kuraĝema; ŝparema kaj tial vasta. Ne anticipas tial povas esti talentulestriĝi. Nun lasu forigi humanecon, kaj intencus kuraĝemiĝi; lasu forigi ŝparemon kaj intencus vastiĝi; lasu forigi posteniĝon kaj intencus anticipi, je tio estus morto! Jen, oni militus

kun humaneco, nome venkus; tiel defendus, nome estus fortika. La naturo certe per tio savos humanecon kaj gardos.

Komentario:

La tri disciplinojn prenis Lao-cu por si mem. Lao-cu intuicias la veron de senperforta registro de Mahatma Gandhi.

P.N.

1) nebonsimilulo - humila pronomo "mi" je patro, instruisto kaj superulo en Ĉinio.

ĉap.68 Bonaj kavalieroj ne estas...

Bonaj kavalieroj ne estas batalemaj. Bonaj militantoj ne koleras. Bone venkanta kontraŭ malamiko ne kontestas. Bone uzanta subiĝas homon. Ĉi tion oni diras: la virto de nekontesto. Ĉi tion oni nomas: la forto uzi homon. Ĉi tion oni nomas natura dono. Tio estas ekstremo de antikveco.

Komentario:

Tiu ĉi estas monstro de la plej alta idealo. Lao-cu rigardis: naturo egalas kun ĉielo, kaj antikveco egalas kun plej alta idealo.

ĉap.69 Pri armeekomando...

Pri armeekomando estas dirita: Mi ne kuraĝas estiĝi, sed sekvantiĝu; ne kuraĝu marŝi colon, sed retiriĝu futon. Tion ĉi oni diras: ne marŝu por marŝi; ne estu kubutoj por maniklevi; por piki ne havu malamikon; ne estu armilo por preni. La domaĝo ne estas pli granda ol ignori malamikon. Ignori malamikon preskaŭ same kun perdi sian trezoron. Tial, tiu, kiu levas armenon, sed samtempe aldonas ĝenmalĝojon, ja venkos!

Komentario:

Estri armeon signifas memfariĝi provokanto. Kaj hombuĉado mem estas jam malvenko antaŭ moralo.

ĉap.70 Mia diro estas tre facila...

Mia diro estas tre facila por scii, kaj tre facila por agi, tamen en la mondo sintrovas nek scipovanto, nek agpovanto. Diro havas principon kaj afero havas precipon. Jen, nur ili estas nesciaj, pro tio ne scias min. Maloftaj min scias, do mi estas valora! (vidu ĉap.41) Tial,

sanktulo sin vestas ĉifone, sed tenas juvelon (spiriton) en sia poŝo.

Komentario:

Ne perdu vian juvelon (spiriton), Se vi vestos ĉifonon.

ĉap.71 Sciante (la vojon) pensi...

Sciante (la vojon) pensi, ke ne scii, estas supra; nesciante pensi, ke scii, estas domaĝo.¹⁾ Jen, nur pensu, ke domaĝon estas domaĝa, do ne afliktiĝos. Sanktulo ne afliktiĝas domaĝon, ĉar li vidas domaĝon, aflikton. Tial ne afliktiĝas.

Komentario:

Korpa malsano estas anima aflikto, domaĝo, aŭ ĉagreno. Do foigu la aflikton pro trankviliĝi.

P.N.

1) domaĝo - aflikto, ĉagreno, malsano.

ĉap.72 Se popolo ne timus...

Se popolo ne timas aŭtoritatecon, ja intervenas pli granda aŭtoritateco! Ne plendu sian loĝejon malvastan; ne abomeni sian vivlokon. Jen, nur ne abomenos; pro tio ne abomenos. Pro tio sanktulo mem scias, tamen ne sin aperigas. Amas sin mem, tamen ne memŝatas. Tial prenas ĉi tiun for de tiu.

Komentario:

Ne timu la minacon de aŭtoritateco de regantaro. Leo Tolstoj eble faris sur tiuj ĉi linioj sian faman rakonton.

ĉap.73 Se estus kuraĝema...

Se estos kuraĝema aŭdaci, do estos mortigita. Se estos kuraĝema ne aŭdaci, do vivos. Ĉi tiuj ambaŭ estas aŭ profita, aŭ malprofita. Kiu sciis kialon, kial naturo malamas? Tial, eĉ sanktulo prenas, ke tio estas malfacila. Kvankam natura vojo ne kontestas, tamen bone venkas; kvankam ne diras, ĝi respondas; kvankam ne invitas, ĝi mem venas. Ĝi estas senpartia, tamen bone artifikas. Natura reto estas larĝega kaj

maldensa, tamen ne perdas kapton.

Komentario:

La celo de naturo ne estus facile divenebla. Laŭ la vojo ne-aŭdaci estas kuraĝo; esti humile kaj ne-protesti estas la vero. Tiel la naturo ne perdas kapt-aĵon.

ĉap.74 Se popolo ne timus morti...

Se popolo ne timus morti, kiel oni terurigus ilin je la morto? Se lasus popolon ĉiam timi morton, kaj strangaganton oni povus preni kaj mortigi, kiu kuraĝus tion? Ĉiam sintrovas mort-direktanto kaj mortigas. Jen, ke mortigi anstataŭ mortodirektanto, oni nomas skrapi anstataŭ granda ĉarpentmajstro. Jen, estas malofte, ke tiu ne vundas sian manon, kiu skrapas anstataŭ granda majstro.

Komentario:

Kontraŭstaro al la mortpuno, kaj tuteca neado de juĝo kaj puno de homo al homo.

ĉap.75 Malsato de popolo devenas...

Malsato de popolo devenas pro tio, ke la superulo multe manĝas imposton. Malfacileco de popolo regi devenas pro tio, ke la superulo artefaras, do ne regebla. Malzorgo pri morto de popolo devenas pro tio, ke ĝi postulas dense vivon, do malzorgas morton. Jen, nur la nefaranto kun sia vivo, tio estas supra ol ŝati vivon.

Komentario:

Jen, frua ideo kontraŭ imposto kaj filozofio de vivo kaj morto. Ŝati vivon kaj malzorgi pri morto signifas, ke oni devas ne laŭ artefaro sin vivigi, sed ĝuu naturan vivon. (vidu ĉap.80).

ĉap.76 Homo ĉe naskiĝo...

Homo ĉe naskiĝo estas mole malforta; ĉe ĝia morto estas malmole rigida. Herboj, arboj kaj ĉiuj ĉe naskiĝo estas molrompeblaj, tamen mortinte tuj velksekiĝas. Tial malmolrigidaj estas kolegoj de morto, kaj malfortmolaj estas kolegoj de vivo. Pro tio se, soldatoj estas fortaj, do ne venkos; se arboj estas fortikaj, do estas

hakkunmetotaj. Fortgrandaj situu suben; malfortmola situu supren.

Komentario:

Natura providenco egaligas ĉion super artefaro!

ĉap.77 La vojo de ĉielo...

La vojo de ĉielo ja, ŝajnas kvazaŭ streĉi kordon de pafarko! La altparton oni subenpremas, kaj levas malaltan; la superfluan malpliigas, kaj aldonas al nesufiĉa. La vojo de ĉielo malpliigas trohavan, sed aldonas al nesufiĉa. La vojo de homo nome ne estas tiel; per manko dediĉas al superfluan, Kiu povas dediĉi al la mondo per superflua havo? Nur tiu estas la vojhavanto. Pro tio sanktulo faras, tamen ne dependas; plenuminte meriton, tamen ne situas. Tio estas, ne volas vidigi saĝon.

Komentario:

Jen la filozofio de homa vivo kaj universa naturo. Nur homoj, kiuj iras laŭ la vojo, povas sperti la naturon. Tiel nomata humaneco, homa vojo tie ĉi estas iniciatata protestante per dinamika

homa forto, nome sociaj klasoj kaj privata posedo.

ĉap.78 En la mondo ne estus...

En la mondo nenio estas malpli forta ol akvo. Tamen el atakantoj kontraŭ fortikaĵo, ne estas tiu, kiu povas superi, ĉar nenio povas ja alterniĝi! Venko de malforto sur forto, kaj venko de molo sur malmolo, ĉiuj scias, tamen neniuj povas agi tion. Tial sanktulo diras: la ricevanto de koto de regno estas nomata estro de l' socio, kaj ricevanto de malfeliĉo de regno estas nomata reĝo de l' mondo. La raciaj vortoj ŝajnas kvazaŭ kontraŭaj.

Komentario:

Mirinda frutempa iniciativo de scienca vidpunkto pri hidrodinamiko. Forte falanta akvofosto povas disfrakasi ŝtalstangon. Do, reganto devas esti plej humila el ĉiuj.

ĉap.79 Granda malamo eĉ se...

Granda malamo, eĉ se repaciĝis, certe restos post-malamon. Tiel, neniel povus fari bonon. Pro tio sanktulo prenas la maldekstran ĉekpecon, la devigatan. Tamen, li ne postulas aliulon. Virtohavanto traktas promesĉekon, dum senvirtulo traktas leĝaron. La naturo ne havas intimulon, sed ĉiam kuniĝas kun bonulo.

Komentario:

Antikva ĉina promesĉeko el bambu-peco, kiu estis hakita en du kaj la dekstran prenis la rajtulo kaj alian la devigato. Malamo ne povas solvi problemon (vidu ĉap.63), nur la senpartia virto de l' vojo estas esenco de la universo.

ĉap.80 Eĉ malgrand-lando...

Eĉ malgrand-lando kaj malmultaj popolanoj; eĉ se sintrovas talentuloj de dekestro kaj centestro, ne lasu uzi; lasu popolon zorgi morton, kaj ne transloĝi malproksimen; kvankam oni havas ŝipon kaj veturilon, neniuj veturas; kvankam oni havas batalilojn kaj armeon, sed neniuj paradas; lasu popolon reiri ŝnurnodon kaj ĝin uzi; manĝu

sian bonguste; vestu sian bele; trankviliĝu en
sia loĝejo; ĝuu sian vulgarecon; kvankam najbar-
landoj interrigardas, kaj voĉoj de kokoj kaj
hundoj interaŭdiĝas, tamen popolanoj ĝis maljun-
iĝmorto ne lasu interviziti.

Komentario:

Tiu ĉi estas fikcia skizo de aspekto de
ideala sociunuo laŭ ideo de Lao-cu, nome
indigena societo kaj libera federacio de
sociunuoj, kiuj aspektas pacifisma reĝi-
mo.

ĉap.81 Kredindaj vortoj ne estas...

Kredindaj vortoj ne estas belaj; belaj vortoj
ne estas kredindaj. Bonulo ne pledas; pledanto
ne estas bona. Scianto ne estas vasta: vastulo
ne scias. Sanktulo ne akumulas. Ĉion faras por
aliulo, sed li des pli havas. Ĉion donas al
aliulo, sed li des pli havas. Ĉion donas al
aliuno, sed li des pli multhavas. La vojo de
ĉielo profitas, sed ne malutilas. La vojo de
sanktulo faras, tamen ne kontestas.

Komentario:

Ideala homo ne akumulas por si mem, kaj

tia senmemeco nature nefaras kaŭzon kon-
testi kontraŭ aliuloj.